

# esperanto.<sup>o</sup> CU

TRIMONATA BULTENO DE KUBA ESPERANTO-ASOCIO



## KERO 2013: cele al plia profesiigo

Maritza GUTIÉRREZ GONZÁLEZ

*La Kuba Esperanto-Renkontiĝo (KERo), kiu ĉi-jare okazis por la dua fojo organizita de KEA estas iniciato kies inspiro-fonto estiĝis en la deziro de la landa asocio pli kaj pli engaĝi la insulan movadon en plian profesiecon kaj klerigadon. Celoj kaj motivoj puŝis la estraron de KEA strukturi kvazaŭ etan kongreson kiu devus enradikiĝi en baldaŭa estonteco.*

KERo 2013 okazis en la bela naturparko konata kiel Ŝtuparoj de Jaruko [Haruko], situanta je 40 km nordoriente de Havano kaj arigis 215 partoprenantojn el 13 kubaj provincoj; krome partoprenis francaj kaj meksikaj geesperantistoj.

Kiel grava momento de la renkontiĝo estis dutaga laborsesio de la Komitato de KEA kies membroj reprezentas ĉiujn provincojn kaj grupojn kiuj aktivis tra la tuta insulo; inter la plej gravaj interkonsentoj estis aprobo de la estrara raporto 2012; aprobo de la Elektokomisiono por la venontjara procezo de elektado de nova estraro laŭ statuta preskribo; decidoj pri la buĝeto en kiu pli da emfazo oni donas al la informa kaj instrua fakoj; decidoj pri disvastigo de la movado al teritorioj kie ankoraŭ ne ekzistas organizitaj grupoj aŭ kluboj; kaj ankaŭ grava interkonsento estis


elekti la elstaran kaj rekonatan kuban aktorinon Georgina ALMANZA (vd. p. 4) kiel Honora Membro de KEA pro ŝia konstanta kaj sindona agado favore al Esperanto-kulturo; ŝi ankaŭ rolas kiel ambasadorino de Esperanto ĉe la kulturaj medioj en la insulo.

La programo de la evento estis riĉa ne nur nombre, sed ankaŭ enhave: okazis sesioj de KEA-ekzamenoj; kurso por komencantoj kaj progresintoj; didaktikaj ludoj; prelegoj pri diversaj temoj movadaj kaj fakaj; la ĵus kreita fakgrupo de radioamatoroj ankaŭ okazigis diversajn kontaktojn kun kolegoj tra la tuta lando, neesperantistoj; kvizo; sportaj matĉoj de volejbalo; ĉiutaga radioelsendo; junulara programo organizita de la Junulara Sekcio de KEA; padumado al la naturparko; arboplantado kaj brilaj kulturaj vesperoj kie koncertis la repa duopo *Fratoj El* kaj la gru-

po *Amindaj*, ambaŭ el ContraMaestre, municipo de la provinco Santiago de Cuba.

Sendube oni povas taksi la eventon sukcesa kaj pri ĝi oni tuj sendis hispanlingvan raporton al la enlanda gazetaro emfazante la rolon de Esperanto kiel lingvo de kulturo, solidareco kaj por justa komunikado.

Multaj gejunuloj partoprenis la eventon kiu sendube enskribiĝas kiel taŭga forumo promesplena; oni jam ekpensis pri la venontjara KERo kaj la eblecoj plibonigi ĝin kiel tutlanda renkontiĝo kie oni semas Esperanton kaj bakas la estontecon de la kuba esperantistaro; ĝi povas kaj volas ankaŭ etendiĝi preter la kubaj landlimoj kaj fari sian kontribuon al la amerika kaj internacia Esperanto-movado. Nu, la defio estas lanĉita kaj la alvoko validas por ĉiuj emaj kontribuantoj. Ĝis revido en 2014!



Grupa foto de la partoprenintoj en KERo 2013. Foto: Roxana Pacheco Reyes, ContraMaestre, Santiago de Cuba

## Dua Arta Festivalo SCENEJO

La Provinca Filio de KEA en Havano alvokas ĉiujn esperantistojn partopreni la Duan Artan Festivalon **SCENEJO** kiu celas stimuli la artan kreadon, la praktikan uzadon de la lingvo kaj la plialtigon de la lingvokapablo.

### KONDIĈOJ

1. Rajtas partopreni ĉiuj esperantistoj.
2. Branĉoj por konkursi estas jenaj:
  - a) Mallonga rakonto (malpli ol 3 paĝoj)
  - b) Poemoj
  - c) Kanzonoj
  - ĉ) Speciala kategorio: Artikolo pri Havano aŭ iu ajn Havanan vidindaĵo.
3. Kanzonoj kaj poemoj devos esti defenditaj de la aŭtoroj aŭ alia interpretisto dum la Festivalo, premio estas por aŭtoroj, sed organizantoj povas aldoni kromajn premiojn al interpretistoj.
4. Limdato por sendi la konkursaĵojn estas je la 15a de septembro, 2013.
5. Lingvo por la konkursaĵoj estas Esperanto.
6. La temo estas libera, krom por tiuj kiuj celas la specialan kategorion.
7. Konkursaĵoj devas esti tajpitaj komputile aŭ skribmaŝine.
8. La verkoj devas esti prezentitaj sub pseŭdonomo, kaj en aparta folio oni devas meti pseŭdonomon, titolon, branĉon, nomon kaj familinomon, aĝon kaj adreson. Tiuj, kiuj celas la specialan kategorion devas indiki tion.
9. Oni rajtas sendi tiom da konkursaĵoj kiom oni deziras, sed ĉiu sub aparta pseŭdonomo.
10. Por premii oni konstatos ne nur la artan kvaliton, sed ankaŭ ĝustan uzon de la lingvo.
11. La ĵurianoj estos anoncigitaj dum la Festivalo.
12. Oni aljuĝos tri premiojn en ĉiu branĉo kaj krompremiojn laŭ decido de la ĵurio. Premiojn oni povas deklari vakaj.
13. Premio estos trofeo kaj estonta publikigo.
14. Ĉiuj gajnintoj konsentas cedi aŭtorrajtojn favore al tiu estonta publikigo.
15. Nepremiitaj konkursaĵoj estos detruitaj post unu monato. Dum tiu periodo, oni rajtos repreni ilin ĉe KEA.
16. Partoprenontoj devigas sin akcepti tiujn ĉi kondiĉojn.
17. Konkursaĵoj povos esti senditaj poŝte al: Kuba Esperanto-Asocio, Vista Alegre 264 entre Juan Bruno Zayas y Luz Caballero, La Víbora, 10 de Octubre, 10500 La Habana; aŭ persone transdonitaj samloke; aŭ retroŝte al Niurka Alonso ĉe: [niurka.alonso@tecsa.cu](mailto:niurka.alonso@tecsa.cu).

## 22-a Internacia Librofoiro Havano 2013

Niurka ALONSO SANTOS



Kuba Esperanto-Asocio, Monda Asembleo Socia (MAS) kaj *Le monde diplomatique en Esperanto*, kiun redaktas s-ro Vilhelmo LUTERMANO, partoprenis per komuna stando la 22-an Internacian Librofoiron okazintan en Havano de la 14-a ĝis la 24-a de februaro 2013, kiu ĉijare estas dediĉita al Angolo. Oni ekspoziciis E-eldonaĵojn, distribuis varbilojn donacitajn de s-ro Martin SCHÄFFER (Meksiko/Germanio), al kiu KEA aparte dankas, kaj respondis al demandoj de interesitoj. Post la Havanaj tagoj, la Librofoiro migris al provincoj, kie KEA ankaŭ kaptis la okazon prezenti Esperanton al interesitoj.

## Radioamatoroj kaj ekologiistoj dum la 2-a KERO

Yordán FONSECA OLIVERA, Havano

Inter la multnombraj aktivecoj okazintaj en KERO (*vd. p. 1*), elstaras la fondo de Klubo de Esperantistoj-Radioamatoroj kun 18 membroj en la tuta lando, el kiuj 9 partoprenis en tiu ĉi evento, kaj kiuj okazigis la unuan kolektivon radioelsendon en la 2-metraj frekvencoj (144.400 kaj 145.800 kHz) kontaktante kun multaj kolegoj kiuj aŭskultis. Ni profitis la okazon por konatigi la E-movadon. Ankaŭ, Kubaj Naturamantoj

(KoNoA) elstaris per la fakto ke ili semis du plantojn, kotonon kaj ceibon, ŝirmitajn per la frazo de José MARTÍ: «La tero ne estas kiel multaj personoj pensas, heredaĵo de niaj gepatroj, ĝi estas pruntedono de niaj gefiloj». Kaj por ĉirkaŭvolvi la fakton en granda manro de amikeco, solidareco kaj amo ĉeestis la duopo Fratoj El (ĉar *el* Contraestre, *el* Santiago el Kubo, *el* Kubo, ktp.), kiu kantis kanzonojn reprimte.



### Mia kontribuo al Kuba Esperanto-Asocio

Liudmila KASHTANOVA,  
Havano



★ Ĉijare mi kotizas en kategorio Membro-Subtenanto (MS, CUP 50.00), plurfoje subtenis finance diversajn agadojn de KEA; ★ En la Provinca Filio Havano, mi laboras en helpa komisiono al prezidantino Niurka ALONSO SANTOS; ★ Daŭre varbas kaj invitas lerni la lingvon; mi transdonas al interesitoj adreson kaj telefonnumeron de KEA, kie oni povas aĉeti lernolibrojn kaj informiĝi pri kursoj; ★ Nuntempe mi instruas hejme la unuan nivelon al du rusaj koleginaj; ★ En marto, tri rusaj koleginaj pagis kotizon en kategorio MS.

## Kie la mitoj? Kie la realeco?

Claude PIRON

*Meze de marto 1979, en la sidejo de Unesko en Parizo, okazis simpozio de la Ne-registaraj Organizaĵoj pri la rajto je komunikado. UEA iniciatis kaj kunorganizis la simpozion, en kiu la Asocion reprezentis E. CHICOT, B. DESPINEY, P. GUÉROUT kaj C. PIRON. La 13-an de marto PIRON enkondukis la simpozian sekcion «Lingvo kaj komunikado» per la ĉi-sekva teksto. Brila en sia malŝabloneco, leĝera, kvazaŭ poemo kun strategie organizitaj strofoj, tiu teksto rikoltis aplaŭdegon eĉ de tiuj skeptikaj simpozistoj. Jen lekcio pri la arto moderne pledi por Esperanto. Ni lernu. Ni traduku kaj aperigu ĝin en la nacilingva gazetar.*

Oni diris al mi, kiam mi estis eta: «Ne timu demandi pri la vojo. Uzu vian langon, kaj vi iros ĝis la ekstremaĵo de l' mondo». Sed kelkajn kilometrojn for, alia lingvo uziĝis. Sin turni al iu surstrate utilis al nenio.

Oni diris al mi: «Por komuniki kun eksterlando, studu lingvojn en klaso». Sed mi konstatis, ke 90 % el la plenkreskuloj ne povas sin plene esprimi per la lingvoj, kiujn ili studis lerneje.

Oni diris al mi: «Per la angla vi povos vin komprenigi ie ajn en la mondo». Sed en hispana vilaĝo mi vidis francan kaj svedan aŭtojn karamboli; la ŝoforoj kapablis komuniki nek inter si nek kun la ĝendarmoj. En tajlanda urbeo mi vidis angorplenan turiston provi klarigi siajn simptomojn al loka kuracisto; kompreniĝo ne okazis. Mi laboris por Unuiĝintaj Nacioj kaj Monda Organizaĵo pri Sano en la kvin mondo-partoj, kaj mi konstatis en Gvatemalo, en Bulgario, en Kongo, en Japanio kaj en multaj aliaj landoj, ke ekster grandaj hoteloj kaj flugkompanioj, la angla estas senutila.

Oni diris al mi: «Dank' al tradukado, la plej malproksimaj kulturoj nun alireblas al ĉiu». Sed kiam mi komparis tradukojn kaj originalojn, mi vidis tiom da missignifoj, da preterlasitaĵoj kaj da stilfuŝado, ke mi nur povis konkludi, ke traduki en niajn lingvojn vere estas perfidi.

Oni diris al mi en okcidentaj landoj, ke la Trian Mondon oni volas helpi, respektante la lokajn kulturojn. Sed mi vidis, ke tra la angla kaj franca pasas plej fortaj kulturaj premoj. Mi vidis, ke senkonsidere al la lingva digno de la aliaj, ni dekomence trudas nian lingvon por komuniki kun ili. Kaj mi vidis la sennombrajn problemojn, kiujn renkontas la trejnoj de l' lokanoj, ĉar la okcidentaj teknikistoj ne scias la regionajn lingvojn, kaj en ĉi-lastaj lernolibroj ne ekzistas.

Oni diris al mi: «Publika instruado garantios egalecon de la ŝancoj al la infanoj de ĉiuj medioj». Kaj mi vidis, precipe en la Tria Mondo, riĉajn familiojn sendi siajn idojn al Britio kaj Usono, por ke ili lernu la anglan, kaj mi vidis la amasojn enŝlositaj en la propra lingvo, submetataj al tiu aŭ tiu propagando, sen ekstera horizonto, tenataj ankaŭ per la lingvo en suba stato sociekonomia.

Oni diris al mi: «Esperanto flaskis». Kaj mi vidis en svisa montara vilaĝo infanojn de kamparanoj glate interkompreniĝi kun japanaj vizitantoj post ses monatoj da lingvoinstruigo.

Oni diris al mi: «Al Esperanto homa valoro mankas». La lingvon mi lernis, mi legis ĝian poezion, ĝiajn kantojn mi aŭskultis. En tiu lingvo mi ricevis konfidencojn de brazilanoj, ĉinoj, irananoj, poloj kaj eĉ juna uzbeko. Kaj jen mi – iama profesia tradukisto – devas konfesi, ke tiuj konversacioj estas la plej spontanaj kaj profundaj, kiujn mi iam ajn havis en fremda lingvo.

Oni diris al mi: «Esperanto estas la fino de ĉio kultura». Sed kiam en Orienta Eŭropo, en Latina Ameriko, en Azio min akceptis esperantistoj, mi konstatis, ke preskaŭ ĉiuj estas pli kulturitaj ol la samlandanoj socie samnivelaj. Kaj kiam mi ĉeestis internaciajn debatojn tiulingve, la intelekta nivelo vere imponis al mi.

Kompreneble mi menciis ĉirkaŭ mi la aferon. Mi diris: «Venu! Vidu! Ekzistas io eksterordinara: lingvo, kiu vere bone solvas la komunikproblemon inter la popoloj. Mi vidis hungaron kaj koreon tiulingve diskuti pri filozofio kaj politiko kun flueco nekredebla, nur du jarojn post eklerno. Kaj mi vidis tion, kaj ankaŭ ĉi tion, kaj plue tion ĉi...».

Sed oni diris al mi: «Ne estas serioze. Kaj, unue, tiu lingvo estas malnatura».

Mi ne komprenas. Kiam la koro de homo, kiam ties impulsoj, kiam la plej fajnaj nuancoj de ties cerbo esprimiĝas rekte, de buŝo al orelo, per lingvo, kiun naskis disflorado da interretnaj komunikoj, oni diras al mi: «Ĝi estas malnatura».

Sed kion mi vidas, vojaĝante tra la mondo? Mi vidas homojn rezigni la sopiratan dialogon kun la loĝantoj de la lando, kie ili pasas aŭ restadas. Mi vidas gestan komunikadon konduki al groteskaj miskomprenoj. Mi vidas personojn soifajn je kulturo, kiujn lingvobarilo malhelpas legi tiom da dezirataj verkoj. Mi vidas multegajn homojn, post ses aŭ sep jaroj da lingvolerno, paroli hake, vane serĉi la ĝustan vorton, uzi ridigan prononcon, kaj fuŝi la nuancojn, kiujn ili volis esprimi. Mi vidas lingvajn neegalecon kaj diskriminacion vigle prosperi tutmonde. Mi vidas diplomatojn kaj fakulojn paroli en mikrofonon, kaj aŭdi aŭskultile alian voĉon ol tiun de la reala kunparolanto. Ĉu tion vi nomas «komuniki nature»? Ĉu la arto problemon solvi kun inteligento kaj sentemo ne plu apartenas al la naturo homa?

Multon oni diras al mi, sed mi konstatas alion. Mi do vagas senkonsila en ĉi tiu socio proklamanta ĉies rajton je komunikado. Kaj mi ne scias, ĉu oni trompas min, aŭ ĉu mi estas freneza.

Claude PIRON (Namuro, Belgio) 26-a de februaro 1931 – 22-a de januaro 2008 (Gland, Svislando) estis svisa esperantisto, lingvisto kaj psikologo; de 1956 ĝis 1961 li ankaŭ estis tradukisto por Unuiĝintaj Nacioj (UN) el la ĉina, angla, rusa kaj hispana al la franca.



En Esperantujo, li nomis sin Klaŭdjo. Inter alie, li estis membro de la Akademio de Esperanto, honora membro de UEA kaj membro de Esperantlingva Verkista Asocio.

Post sia laboro ĉe UN, li laboris por Monda Organizaĵo pri Sano tra la mondo, kaj multe verkis Esperante. Li ankaŭ uzis Esperanton en multaj landoj, inkluzive de Japanio, Ĉinio, Uzbekio, Kazaĥio, kaj kelkloke en Afriko kaj Latinameriko, kaj preskaŭ ĉiuj eŭropaj landoj. Li instruis Esperanton ĉe la Ŝtata Universitato de San-Francisko, en Usono.

Li estis psikoterapiisto kaj instruis en la psikologia fakto de Ĝeneva Universitato (Svislando), de 1973 ĝis 1994. Lia franclingva libro *Le Défi des langues – Du Gâchis au bon sens* (La Lingva Defio – El haoso al sana prudento), Parizo: L'Harmattan, (1994) estas speco de psikanalizo de internacia komunikado. Portugala versio, *O desafio das linguas*, aperis en 2002 (Campinas, SP, Brazilo: Pontes).

Lia verkaro inkluzivas lernolibrojn, facilajojn, romanojn, novelojn, poezion, fakto-librojn, kaj artikolojn. Liaj plej famaj verkoj estas *Gerda malaperis* kaj *La Bona Lingvo*. Li ankaŭ verkis romanojn sub pseŭdonimo Johán VALANO.

*Gerda malaperis* estas romaneto, lernolibro kiu uzas bazan gramatikon kaj estas aranĝita tiamaniere, ke ĉiu ĉapitro kompreneblas pli facile ol la posta; ĝi laŭgrade kondukas al sperta Esperanto; fine, vortlistoj ekzistas por kelkaj lingvoj, do komencantoj facile sekvas la lecionojn. Ĝi jam iĝis bazo de unu el la senpagaj retpoŝtaj kursoj.

En *La Bona Lingvo*, PIRON kaptas la bazajn lingvistikajn kaj sociajn aspektojn de Esperanto. Li tezas, ke Esperanto pli facilas ĉar ĝi respegulas bazajn mensajn principojn rilate al lingva lernado, inter alie kaj plej grave, la ĝeneraligo de gramatikaj formoj kaj reguloj. Li argumentas kontraŭ enporto de novaj radikoj, montrante la esprimovon de baza vortprovizo kaj imagema kunmetado.

Piron tradukis kantojn el pluraj lingvoj kaj fojfoje mem prezentis ilin, akompanante sin per gitaro. En 1982 aperis ĉe LF-koop lia son-kasedo «Frandu Piron».

Fonto: *Vikipedio*, konsultita 2010.11.24.

## Ambasadorino de Esperanto



S-ino Georgina Almanza Lanz kaj la Ĝenerala Direktoro de UEA, s-ro Osmo Buller, dum la prelego okazinta pasintjare en la sidejo de ACNU en Havano okaze de la Tago de Unuiĝintaj Nacioj. Foto: Arkivo KEA.

La rekonata kuba aktorino Georgina ALMANZA LANZ estis ĉi-jare distingita de Kuba Esperanto-Asocio kiel Honora Membro pro ŝia multjara agado favore al la Esperanto-kulturo ene kaj ekster nia lando.

Inter ŝiaj meritoj estas la brila prezento, kiu atentigis nin pri la arta kvalito de kuba aktorino kiu premieris por esperanta publiko dum la 75-a UK okazinta en Havano julie de 1990; sekvis aliaj elstaraj momentoj dum kongresoj en Hispanio, Francio, Belgio kaj aliaj.

Per ŝia arto ni povis ĝui monologojn kaj poemojn de diversaj aŭtoroj kubaj, latinamerikaj kaj esperantistaj. Ŝi ricevis de UEA la diplomon de Elstara Arta Agado pro ŝia kontribuo al la esperantista kulturo.

En Kubo ŝi profitas ĉiujn okazojn por prezenti sian arton ankaŭ en Esperanto kaj dum intervjuoj ĉe radio kaj televido ŝi mencias sian esperantistan agadon, tial ŝi gajnis inter ni la titolon de Ambasadorino de Esperanto en Kubo.

## Lingva diverseco en Latinameriko: faktoj kaj minacoj

(Parto 1)

Maritza GUTIÉRREZ GONZÁLEZ

La realo evidentigas ke prilingva agado ĉiam konsistigis gravan komponon de la registraj politikoj, kio konfirmeblas en la dediĉaj paroloj de ANTONIO DE NEBRIJA, aŭtoro de la unua gramatiko de la kastilia lingvo, al la katolikaj reĝoj en 1492 kie li skribis: «lingvo akompanas la imperion».

Por granda parto de Ameriko, kies historio de integriĝo en la mondon okcidentan tiam komenciĝis, tiu ĉi sentenco signifis la unuan grandan skismon en ties tradicia hejmlingvo.

Tamen, nuntempe, la stratetiga karaktero de la lingvo en la integriĝaj procezoj okazantaj, elvokas tre speciale, pri la novaj defioj implikitaj el la lingvistikaj politikoj. Konsekvence, la inkluzivigo de tiuj ĉi lingvoj en ĝeneralan projekton de

daŭripova evoluo estas evidente prava.

En la mondo ekzistas nuntempe ĉirkaŭ ses mil lingvoj, el kiuj 2 mil 500 riskas malaperi, kaj inter la landoj kun pli da minacataj lingvoj, Meksiko okupas la kvinan lokon kun 144 lingvoj en iagrada risko, laŭ raportas la *Atlaso de la endanĝerigitaj lingvoj en la mondo*.

Tiu ĉi dokumento ellaborita de la Organizaĵo de UN por Edukado, Scienco kaj Kulturo (UNESCO) klarigas ke en Meksiko ne malaperis lingvo ekde la dua duono de la 20-a jarcento, sed inter la ekzistantaj lingvoj, ekzistas 21 kies situacio estas kriza, aliaj 33 estas serioze endanĝerigitaj, 38 en danĝero kaj 52 vundeblaj, kio sumas entute 144 lingvoj. (daŭrigota)

Kuba Esperanto-Asocio  
Apartado 5120, 10500 La Habana, Cuba  
+53 7 640 4484  
info@esperanto.cu.cu  
www.esperanto.cult.cu

esperanto  
CUBA



www.lernu.net



esperanto.cu estas trimonata eldonaĵo sendita al komitatanoj, estraranoj kaj aktivuloj de KEA. Reta versio elŝuteblas de nia retejo [www.esperanto.cult.cu](http://www.esperanto.cult.cu). Redaktis: Alberto F. Calienes, Maritza Gutiérrez kaj Javier Ramos. Enpaĝigis: Alberto F. Calienes kaj Y. Mayol.

esperanto  
CUBA